

Ni dankas al Mireille Grosjean el Svislando, kiu sendis la bildojn, kiujn desegnis samlandano J. Borer.


Kiu telefono plej plaĉas al vi? Kial? Elpensu amuzajn nomojn por la diversaj aparatoj. Ekzemple, numero unu povus esti: frostofono, du: rorofono, kvin: ridofono. Elpensu telefonojn unike taŭgaj por aliaj personoj – kaj por vi!

Por ĉiu telefono decidu, kiu telefonas, kiun mesaĝon tiu volas diri kaj kion respondos la apudilulo. Verku amuzan dialogon kaj sendu ĝin al ni. La plej bonajn ni aperigos kaj ni donos libropremiojn kaj la afiŝon en la mezaj paĝoj.

Limdato: 1a de marto 1991.

## INTERNACIA LERNEJANA ESPERANTO-REVUO

Novembro, n-ro 90/4  
(55), 17a jaro



TELE  
FONOJ  
TELE  
SONOJ

Juna amiko, revuo por lernejanoj kaj komencantoj. Eldonata de la Hungara Esperanto - Asocio kaj aŭspiciata de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Aperas kvarfoje jare: februare, aprile, septembro kaj novembre.

Redaktoro kaj grafiko: Stefan MacGill.

Adreso de la redakcio: pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

Abonprezo en Hungario ĉe HELIR: 40 ft. (por eksterlandano 48 ft.) Internacie ĉe UEA: 8,40 gld.

Anoncoj:

Kvaronpaĝo: 250ft soclande aŭ 25gld aŭ 3 jarabonoj en aliaj okcidentaj valutoj.

Duonpaĝo: 420ft aŭ 42gld. aŭ 5 jarabonoj.

Tuta paĝo: 600ft. aŭ 60 gld. aŭ 7 jarabonoj.

Argentino, Hispanio, Japanio kaj orienta Germanio por eĉ pli internaciigi nian legantaron. Niaj fidindaj ekzistantaj perantoj, kiuj bonege laboris, precipe en la lasta jaro, ĝuste donas al ni esperon povi pluiri kaj spite ĉion aperigadi la revuon. Koran dankon al ili, al nia ilustristo Pavel Rak, al ĉiuj kontribuintoj kaj legantoj, kaj ĉion bonan por la jarfino kaj jarŝanĝo!

Ŝipestre,

smg, nov 10

En septembro 1986 via nuna redaktoro komencis prizorgi ĉi tiun revuon. Pasis de tiam kvar jaroj, en kiu aperis regule dek ses numeroj, de 39 ĝis 55. En niaj mezaj paĝoj vi povas vidi el tabelo, kiom internaciigis nia legantaro — de dudeko da landoj tiam ĝis 48 nun. Legantoj en okcidentaj landoj kreskis de 6 ĝis 553. Sed tiu tabelo donas spuron pri mal-kresko, kaj la apuda artikolo 'Bona novaĵo, malbona novaĵo' donas la kialon kaj montras, ke tiu spuro estas nur pinto de timige granda glaci-monto.

Kiam ekondis kaj eĉ inundis la ŝanĝoj politikaj, sociaj kaj ekonomiaj en nia parto de la mondo antaŭ unu jaro, ni ne imagis, ke tiom subite ni enirus maron da problemoj. La danĝeraj glacimontoj solidiĝis pro la disfalo de tradiciaj komercaj rilatoj inter la iamaj socialismaj landoj, kaj jam pli ol unu hungara esperanta gazeto suferis sorton de Titanic, kaj sinkis for de vido.

Multaj pliaj glacimontoj alfloras por timigi nin — ĉu esperantistoj, ĉu ne — kaj sinkigi multajn aferojn, iujn indajn de konservo, aliajn indajn je droniĝo. *Juna amiko* devas mem naĝi tre forte kaj navigi sin tre lerte por eviti kolizion kaj pereon. Feliĉe nia okcidenta legantaro jam provizis nin per savboato, uzebla por subteni nin ĝis ni atingos pli mildajn kaj varmajn akvojn. Ni serĉas krome perantojn kaj pagvojojn en la landoj al kiuj ni ne plu povas ekspedi la revuon oficiale — esence Sovet-unio, Ĉeĥoslovakio, Bulgario kaj Germana DR. Ni bonvenigas novajn perantojn en Rumanio, Ĉilio,

Nemzetközi eszperantó diáklap. Megjelenik évente négyszer. Ára: 10 ft. 90/4 szám, XVII évfolyam. Ára 1991: 15 ft. Kladja a Magyar Eszperantó Szövetség, Szentháromság tér 6, H-1014 Budapest. Felelős kiadó: Princz Oszkár. Készült a MESZ Sokszorosítóban: hearota 90-000 Kiad. eng. szám: III/IFJ/30/1976; ISSN 0230-1318.

Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkiébesítő postahivatalnál, a hírlapkiébesítőknél, a Posta hírlapüzleteiben és Lapellátási Irodánál (HELIR), Budapest, XIII, Lelhel u. 10/a, 1900 — közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a HELIR 215-96162 pénzforgalmi jelzőszáma.

# Decembraj infan-kantoj

el la kantaro *Forrai*

192. "Jaj, de pompás fa..."

Pimpe pompa arb', por-Kristnaska arb'!  
Ĝi ne ombras nur lum-ludas, pimpe pompa arb'!  
Brilas ĉiu frond', en kandela rond',  
Lumas la pice-stelaro al la tuta mond'.

196. "Hull a pelyhes, fehér ho..."


Sur la kampoj neĝ-piĝam', Nikolao venu jam.  
Ni atendas tre-tre Vin, al Vi kantas ni sen fin'.  
Niaj botoj vakas, ho!, via sako dikas tro,  
Gapas ni Vin el angul', venu kara decembrul'!

198. "Suttog a fenyves, zöld erdő..."

En la pinar' sufloras fam':  
Nikolao venas jam.  
Sled-sonoril' salutas nin  
Je l'okazo de jar-fin'.  
Neĝe alvenas vintra vent',  
Treme lirlas la torent'.  
Vento-blovita bunta tuk' —  
Sub ĝi flavas foli-kuk'.

199. "Télapó itt van ..."


Sub neĝo-pelto jen Nikolao,  
En glaci-ŝuoj kun prujna nazo,  
Sak', sak', dika sak', povra sledo diras: krak'.  
Slede li flugis, cervoj ĝin tiris,  
Pufa la sako dise bloviĝis,  
Sak, sak, dika sak' ...



prujno: glacia rando  
bunta: mult-kolora  
lirli: milde flustri  
piceo: speco de pinarbo  
pompa: digne majesta  
pimpa: gaje loga

frondo: branĉo kun folioj  
piĝamo: nokta vestaĵo  
gapi: rigardi grand-okule  
pelto: besto-haŭta vestaĵo  
(ĉi tie uzata figure)  
suflori: flustre komuniki mesaĝon

Tradukis: Sándor Révész,  
kiu tradukis multe pli da  
infan-rimoj kaj certe  
volonte disponigos ilin  
al instruistoj:  
Epreserdó u. 32 | 4  
H-1098 Budapest.



Melodio: nekonata

Traduko el la nederlanda:

Tom Verwoerd

## La Marbanano

1. *Mi es-tas mar-ba-na-no kun krevo en la*

*kra-no. Mi ludas tubjon en fanfar,' tre-*

*madas brue la ondar' de l'mar,' de l'mar,' de l'mar'.*


2. Mi estas markastoro.  
En mia kor' doloro.  
Mi ploras pro sepia tuŝ,  
Kaj malodoras sub la duŝ.  
Ho, mor', ho mor', ho mor'!

3. Mi estas marvulturo.  
Jen apertur' en kruro.  
Min vundis la ekina pik':  
mokridas min la Pacifik'.  
Terur', terur', terur'!

**KONKURSA REZULTO:** La konkurso en numero 90/1 altiris nur ses respondojn: el GDR, PL, SU, kaj F. La kaŝita frazo estas: Muso tro sturmos post provo sur spuro-truo, trovos urson — osto-romponton. Gajnos premiojn 8-jara Lunjo Parad el Kirov, Sovet-unio kaj 11-jara Lukasz Sokol el Ruda Slaska, Pollando. Gratulon!

## Kiu respondo estas ĝusta?

Karolo preparis ok demandojn kaj skribis por ĉiu demando tri respondojn. Kiu respondo ĝustas?



1. Se oni varmigas akvon ĝis cent gradoj, ĝi...  
A: bolas.  
B: solidiĝas.  
C: diseriĝas.
2. Se oni observas sennuban noktan ĉielon, ni vidas...  
A: stelojn kaj ĉiam lunon.  
B: nur lunon.  
C: stelojn kaj foje lunon.
3. Se oni renversas en vakuo sitelon kun akvo, la akvo...  
A: falas al la planko.  
B: elfluas el la sitelo kaj malsekigas ĝin.  
C: restas en la sitelo.
4. Roso estiĝas, ĉar...  
A: la tero kaj la ŝtonoj eligas akvon.  
B: vaporo pro relativa nokta malvarmo likviĝas.  
C: la terglobo rotacias tiom rapide, ke ĝi ŝvitas.
5. Se ni havas solidan karban kubon, kiu estas enmetebla en keston, tiel ke ĝi precize plenigu ĝin, kaj ni poste disbatas kaj pulvorigas ĝin, ...  
A: La kesto sufiĉas por precize enteni la tutan pulvoron.  
B: La kesto entenas la pulvoron kaj restas en ĝi libera spaco.  
C: Estas pli da pulvoro ol la kesto povas enteni.
6. Se vi rigardas tra ruĝa vitro, vi vidas...  
A: ĉiujn kolorojn ruĝe.  
B: ruĝon nigre, ĉiujn aliajn kolorojn ruĝe.  
C: nigron ruĝe, ĉiujn aliajn kolorojn nigre.
7. Se oni verŝus benzinon sur fajron, ...  
A: la fajro estingiĝus.  
B: okazus danĝera eksplodo.  
C: la fajro plimultiĝus.
8. Se oni kalkulus ĝis miliono, dum ok horoj ĉiutage, oni bezonus ...  
A: du tagojn.  
B: tridek kvin tagojn.  
C: ok tagojn.

Ĉi tiun rubrikon gvidas Josef Chvosta, Leninova 16, CS-290 01 Podebrady, Ĉeĥoslovakio. Sendu ĉiujn korespondaĵojn kaj respondojn rekte al li.

## La maljuna viro irante al la lernejo

Antaŭ tre longa tempo vivis du malriĉaj homoj. La viro laboris pro taga salajro, kaj la virino estis mesaĝistino. Iun tagon la maljunulino devis viziti la pastran domon. Kiam ŝi staris tie en la kuirejo, la kuiristino ĵus forprenis pecon da viando el la kaldrono, tiom belan, grandan kaj grasan pecon da viando.

”Ah, Dio!” suspiris la maljuna virino: ”Povu ankaŭ ni iam manĝi tiom bonan viandon!”

Tion aŭdis la pastra virino, enirante en la kuirejon kaj diris: ”Ja, mia kara, via edzo ne sufiĉe lernis. Se li ankaŭ tiom multe lernis, kiom mia edzo, do ankaŭ vi ambaŭ povus manĝi samgrandan belan grasan viandon.”

”Nu!” diris la mesaĝistino: ”Do, tio estas la kaŭzo.” Kiam ŝi venis hejmen ŝi diris: ”Patro, ĉu vi scias? Nia pastra virino diris, ke vi ne sufiĉe lernis. Se vi lernus tiom multe kiom ŝia edzo, ankaŭ ni povus manĝi tiom grasan viandon kiom ili havas en la kaldrono. Kaj nun mi pensas, kiel estus, se vi ankoraŭ iomete irus al la lernejo kaj lernus iomete pli multe.”

”Jes, patrino, se vi opinias tion bona, mi ja provos fari tion.”

”Bone, patro, mi tuj havigos A-Bo-Co-libron kaj vi foriros kun la gelernantoj.”

Kiam la maljuna viro sekvamaten eniris en la lernejon kun la ABC-libro en la mano, la lerneja ĉefo mire rigardis lin: ”Ej, mia kara, kion vi volas?”

”Mia edzino opinias, ke mi ankoraŭfoje iru al la lernejo por lerni iomete pli multe.”

”Mia kara viro, lasu tion, ĉar nun estas tro malfrue por tio. Bonvolu reiri hejmen.”

La edzino miris, ke la edzo tiom frue revenis.

”Ĉu la lecionoj jam forpasis?” ŝi demandis.

”Tio ne,” li respondis: ”sed la direktoro resendis min hejmen. Li diris, ke estas tro malfrue. Do, mi morgaŭ devas ekiri iomete pli frue.”

”Jes, patro,” respondis la maljunulino: ”vi ellitiĝu pli frue.”

Do, la postan matenon la viro foriris unu horon pli frue.

”Ba!” diris la lerneja ĉefo: ”Vi ja denove estas ĉi tie.”



”Jes, hieraŭ vi diris, ke mi venis tro malfrue. Do, mi ekiris unu horon pli frue.”

”Ne, kara viro, vi miskomprenis min. Mi diris, ke vi jam tro maljunas veni al la lernejo ankoraŭfoje.”

La viro devis hejmeniri, li estis malĝoja, li piediris laŭ alia vojo, sed tie — li trovis grandan sakon plena je mono!

”Nun patro,” vokis la edzino, kiam li ekvenis hejmen: ”ĉu la lecionoj jam forpasis?”

”Tio ne, patrino, sed la lerneja ĉefo diris, ke mi estus tro maljuna lerni. Sed tamen valoris iri al la lernejo. Vidu, mi trovis grandan saketon plena je mono.”

”Ho, patro, vi devas fordoni ĝin al la oficejo, vi ne rajtas reteni ĝin! Sed eble vi trovos kompenzon de la trovinto.”

Do, la maljunulo iris al la oficejo: ”Nun, kion vi deziras?” demandis la oficisto.

”Ja, sinjoro, oficisto,” li respondis: ”mi trovis monon kaj mi volas transdoni ĝin.”

”Ĉu? Kiam vi trovis ĝin?”

”Kiam mi venis el la lernejo.”

”Bona viro,” diris la oficisto kaj ridis: ”tion vi rajtas reteni. La mono, kiu laŭleĝis tiutempe, jam delonge ne validas kaj nenion valoras.”

Do, la maljunulo portis la monon hejmen!

#### VORTKLARIGOJ

mesaĝisto: kuriero

suspiri: ĝemi

miro: surprizo

rekompenco: premio pro bona faro

laŭleĝi: esti konforma al la leĝo (Stat-reguloj)

*Tradukita el germana fabelaro  
de H. Bieler, Hagenow, Germanio.*

## Kanto-kasedo el Hungario

### Dinnyés: AL VENKO!



16 esperant-lingvaj kantoj de la fama gitaristokantisto József Dinnyés (prononcu *Joĵef Dinjeŝ*). Krom liaj kantoj vi povas ĝui ankaŭ melodiigitajn verkojn de famaj Esperantaj aŭtoroj, kiel R. Schwartz, J. Baghy, L. Zamenhof kaj aliaj. Bonkvalita registraĵo, bela aspekto. Por aĉeti la kasedon, turnu vin al via Libroservo. Eldonis: LINGVO-Studio, Budapeŝto

# Manĝi koreastile

Facilas manĝi malmultekoste en Koreio. Manĝejoj amasas preskaŭ ĉie en la grandaj urboj, ĉie, kie troviĝas vendejoj kaj oficejoj. Vi elektas inter deko da pladoj kaj pagas inter 800 kaj 1500 ŭonoj (8 ĝis 15 francaj frankoj). Manĝejoj ofte malgrandas enhavante nur kelkajn tablojn, por ĉirkaŭ 15 klientoj. Kuirejo ĉiam troviĝas en la sama salono kaj necesejo plejofte ne estas. Homoj, ĉu laboristoj, ĉu promenantoj, manĝas rapide kaj silente. Pureco estas foje dubinda sed mi ne plu atentis tion.

Post vizito al tia manĝejo mi sufiĉe satas, kvankam mi dubas, ĉu mi ricevis sufiĉe da proteinoj. Aliaj manĝejoj pli grandaj enhavas unu aŭ plurajn ĉambrojn por klientoj, kiuj venas grupe – amikoj aŭ kolegoj. Antaŭ ol eniri iun tian ĉambron, oni devige senŝuiĝas kaj poste sidiĝas surplanke, kruroj interkrucigitaj, ĉirkaŭ malalta tablo. Tiu sidpozicio ne tro komfortas al okcidentanoj, kiuj devus ekzercadi sidi tiel antaŭ ol vojaĝi ĉi-tien.

Alia ebleco por manĝi ankoraŭ pli rapide estas mendi la manĝon per telefono. Tiukaze, post duona horo junulo envenas la oficejon kun metala kesto entenanta la diversajn mendojn. Vi manĝas samrapide sed ne plu bezonas eliri la oficejon.

Multaj koreoj plenigas la stomakon en manĝejoj ĉiutage pro oportuno, sed ili ankaŭ ŝatas foje viziti restoraciojn. La plej ŝatataj estas koreaj, sed troveblas ankaŭ japanaj, ĉinaj kaj okcident-stilaj. Mi fine mencias la ekziston de 'MacDonald's' kaj aliaj tiuspecaj manĝejoj, kiujn mi neniam vizitas.

Manĝi en familia hejmo estas ĉiam pli lukse kaj bonguste ol ne manĝejo. Laŭ la nombro da familioj kiujn mi vizitis, oni plej ofte manĝas surplanke ĉirkaŭ malalta tablo, tutcerte, kiam venas gastoj. Tamen ŝajnas al mi, ke pli kaj pli da koreoj manĝas sidante kiel okcidentanoj ĉirkaŭ alta tablo, kiu troviĝas en la plimulto de la hejmoj. Ĉiuj koreinoj lernis kuirarton de sia patrino kaj uzas multe da tempo por kuiri.

Viroj, laŭ tio, kion mi vidis, kutime ne helpas. Nuntempe virinoj manĝas kune kun la viroj, krom en kelkaj konfuceanismaj familioj. Tamen, kiam venas gastoj, la dommastrino (t.e. la edzino) manĝas aparte aŭ poste pro la daŭra kuir-preparado. Male al japanoj, kiuj uzas nur bastonetojn, korea malĝilaro konsistas el basonetoj kaj kulero. Por kelkaj manĝaĵoj, ankaŭ manoj uzeblas. Mi bezonis nur kelkajn tagojn por lerni ĝustan uzadon de lignaj bastonetoj, unu monaton por la metalaj, kiuj tre glitemas.

Manĝi koreastile ne ĉiam oportunas laŭ mi: Dum montopromenado, necesis pli ol unu horo kaj duono por la inoj en nia grupo pretigi la manĝon.

*Alex Clabaut*

*Franco nuntempe loĝanta en Koreio por instrui Esperanton*



# BONA NOVAĴO, MALBONA NOVAĴO

*La bona novaĵo* estas, ke la nombro de abonantoj en okcidentaj landoj bele kreskis de 333 ĝis 553 — elstaris Brazilo, Francio, Usono, Belgio kaj Svedio.

*La malbona novaĵo* estas, ke la suma nombro de abonantoj falis de 4100 al 3700 — ĉefe pro faloj en Sovet-unio, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Jugoslavio.

*La bona novaĵo* estas, ke abonoj tie estas draste malprofitaj ĉiuokaze.

*La malbona novaĵo* estas, ke ni jam ne plu rajtas ĝoji, ke la revuo atingas infanojn kaj legantojn tie, sed ni devas mezuri la bonecon de novaĵoj nur laŭ tio, ĉu la revuo funkcias profite aŭ ne.

*La bona novaĵo* estas, ke spite tiun novan realecon/liberecon, la tuta jarkolekto por 1990 sukcesis aperi pli-malpli ĝustatempe kaj orde ekspediĝi (tio estas pli bona novaĵo ol vi verŝajne imagas!)

*La malbona novaĵo* estas, ke *Juna amiko* devos serĉi novan eldonejon por 1991, kaj pro tio devas montri sin ekonomie ekvilibra jam tuj.

*La bona novaĵo* estas, ke ĝi jam ekmovas montojn sukcesi en tio (feliĉe en Hungario la plej alta monto altas ne pli ol 1015 metrojn). Ni provos unue ĉe la komerca kompanio starigata el la siatempa eldonejo kaj libro-butiko de HEA, due ĉe la kerna HEA mem, trie ĉe aliaj esperantistaj eldonejoj en Hungario, kaj nur lastkaze ĉe eksterlandaj eldonejoj.

*La malbona novaĵo* estas, ke ni riskas perdi inter mil kaj du mil abonantojn el Sovet-unio kaj la ceteraj orient-eŭropaj landoj, pro la kolapso (aŭ perdolarigo) de komercaj rilatoj inter ili.

*La bona novaĵo* estas, ke ni diligente serĉas (kaj trovadas) movadajn perantojn en SU, CS, RO, PL kaj BG kaj serĉas (sed ne trovas) pagovojojn.

*La malbona novaĵo* estas ke eĉ en Hungario la oficialaj pagovojoj riskas kolapsi, sed fideblaj informoj eĉ nun simple ne haveblas.

*La bonega novaĵo* estas la daŭre kreskanta okcidenta abonantaro, zorge konstruita tra la lastaj kvar jaroj kunlabore kun findindaj perantoj, kiu estante

**Grava anonco por legantoj de la revuo *Juna amiko* (numero 90/4), kiun ignoru posedantoj aŭ legantoj aŭ admirantoj de la afiŝo formita el ok paĝoj el la ĵus menciita revuo:**

Eble vi rimarkis, ke ĉi tiu paĝo estas presita flanke. Tio ne estas hazardo, redaktora perverso aŭ presista fuŝo — ĝi formas la maldekstran malsupran angulon de rekorde granda afiŝo por nia revuo. Se vi volas ricevi ekzempleron de la afiŝo: 1) sendu al ni kontribuojn kaj petu ekzempleron, 2) partoprenu la konkurson sur paĝoj 23 kaj 24.

Sur la paĝoj 12 kaj 13 vi legos la finon de bildstrio sendita de Pavel Majorov el Sovet-unio. Se, rigardante la trian bildon, vi scivolos, kial unu rotulo malĝojas — vi trovos la komencajn bildojn kun la solvo sur p. 16. Per la miraklo de moderna teknologio, la vicordo ĝustigos por la afiŝo — se ne fuŝis la redaktoro aŭ perversos la presistoj!

nur 15% de la tuto, tamen kreas 60% de niaj enspezoj, kaj kiu permesos nin trapasi la nunan krizon kaj ne morti kiel la aliaj hungaraj gazetoj.

*La malbona novaĵo* estas, ke ni devas nun puni tiujn, kiuj malmeritas tion. Nome, prezaltiĝo okcidente estas tuj komunikibla kaj tuj kreas enspezojn por pagi la presiston kaj permesi pluan eldonadon. Do, ni devas retiri nian deklaron en JA 90/3 pri senŝanĝa tarifo.

*La bona novaĵo* estas, ke la altigo ne estas tiom granda (de 8,40 gld. al 10,00gld., kaj por landoj kiel Brazilo, Argentino ktp. ni ne petas altigon.) Se vi jam pagis laŭ la malnova tarifo, ni akceptos tion.

*La malbona novaĵo* estas, ke por la orientaj landoj ni devos peti pli grandan altigon, por ke la pagoj kovru almenaŭ 70% de niaj rektaj kostoj (anstataŭ ĉ. 40% kiel nun.) Do, la hungara prezo altiĝos de 40 al 60 forintoj.

*La bona novaĵo* estas, ke nia prezaltiĝo palas en nenion, kompare kun tio, kion vi spertus, se vi uzus la oficialajn pagojn: ekz. en Ĉeĥio ni petos 40 kironojn, dum la oficiala PNS postulas 204! (t.e. duoble pli ol pagas usonano!).

*La malbona novaĵo* estas, ke bonaj novaĵoj elĉerpiĝis pli frue ol la bonaj.

*La malbona novaĵo* estas, ke por kelkaj landoj la abono estos pli alta ol anoncita ne nur en JA 90/3 de septembro, sed pli ol en nia peranta cirkulero oktobre, pro ĵusaj diskutoj en Poprad inter estroj de orient-eŭropaj movadoj.

*La malbona novaĵo* estas, ke ekde 1992, ĉiu abono devos kovri la realajn produkto-kostojn de la revuo, kiuj eĉ nun kalkuleblas je almenaŭ 120ft.

*La malbona novaĵo* estas, ke ĝis 1992, ili estos jam multe pli altaj!

*La bona novaĵo* estas, ke almenaŭ ĝis hodiaŭ, ne estas pli da malbonaj novaĵoj.

Salutas rid/plore,  
fidante je via subteno kaj frua reabonado

Stefan MacGill, nov.5, 1990

## PERANTOJ DE JUNA AMIKO por 1991

Nia ĉefa internacia peranto estas Universala Esperanto-Asocio. Vi povas pagi al ilia Centra Oficejo rekte en guldenoj, ankaŭ multaj el iliaj landaj perantoj akceptos abonojn en via enlanda valuto. Jen niaj proponaj perantoj kun abon-prezoj. La unua cifero estas tiu por unuopa jarabono (4 numeroj). La postaj ciferoj estas la po-abona kosto por kolektivaj abonoj por respektive 3 ĝis 7, 8 ĝis 29 kaj ekde 30 ekzempleroj.

Internacia: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando (pĉk. 378964). 10gld., 8gld., 7,00gld., 6,00guldenoj. Aere ekstereŭrope.

Migranta: Jorgós Comte, St. Felix de Rieutort, F-09120 Varilhes, Francio, aŭ ĉe la biciklo laŭ la enlanda tarifo.

Argentino: Argentina Esperanto-Asocio, C.C. 1428, RA-5000 Cordoba. Laŭ la brazila tarifo: petu la enlandan tarifon. Aere.

Aŭstralio: Sylvia Burkitt, 20 Grandview St., Parramatta, NSW 2150. \$A9, 7, 6,50, 6. Aere.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuberg. 70öS, 60, 55, 50.

Belgio: Flandra Esp-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. 200BEF, 170, 160, 150.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 11-1105, BR-70084 Brasília (DF). 8,40; 7,50; 7,00; 6,00 gld. Pri enlanda tarifo decidias BEL. Aere.

Britio: P. Hewitt, 26 Highfield Rd, North Thoresby, Great Grimsby, South Humberside, DN36 5RT. 3; 2,80; 2,50; 2,00 pundoj.

Bulgario: ŝtata perejo REP ŝajne ne funkcias plu. Lilja Koleva, bulv. Cv. Radojkov 10 bl. 2, vh B, ap. 34, BG-1504 Sofia. 4,00; 3,5; 3 kaj 2,5 levoj pormomente.

Ĉeĥoslovakio: Rezignu pri PNS. Ĉefa peranto anoncota: informiĝ de ĈEA, Jiŝka 10, CS-110 01 Praha. En slovakio: SEA, Sobotske nam 6, CS-058 01 Poprad. 40, 35, 30, 25 kr.

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curico; ĉekkonto 425-000-74391 ĉe Banco del Estredo de Chile. Abonoj kiel Brazilo.

Ĉinio: Zhang Danchen, Gong Wai Xi, Shifan Daxue, Wuhan, Huazhong. 4; 3,50; 3 juanoj.

Francio: UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris. 30; 27; 25; 22FF.

Germanio: Esperanto-Centro Paderborno, Grünigerstr. 5, D-W-4790 Paderborn, kaj J. Pachter, Zum Kreuzbühl 16, D-W-7480 Sigmaringen. 8; 7,50; 6,00; 5,00 DM.

Germanio orienta: PVZ supozeble ne plu eblas. Rolf Beau, Jacobstr. 9, D-O-7010 Leipzig (konto 5602-39-22320). 5; 4,50; 4; 3,50DM (tarifo nur por loĝantoj de orienta Germanio).

Hispanio: Francisco M. Munoz Garre, Camino del Carcanox s/n, E-30580 Alquerias (Murcia). 500; 450; 400; 350 pesetoj.

Hungario: Ĉe ĉefaj poŝtoŝtancoj aŭ rekte ĉe HELIR, Lehel u. 10a, H-1900 Budapeŝto, prefere antaŭ la jarkon. Jarabono 60 forintoj. Donacabono por eksterlandanoj 72 ft. Konto HELIR: 215-96162. Kolektivaj kaj malfruaj abonoj kaj mendoj de malnovaj numeroj ĉe "Juna amiko", p/a HEA, pf. 193, H-1368 Budapeŝto. 70, 60, 55, 50 ft. (MESZ, OTP VIII ker. fiók 516-10005).

Israelo: Aviv Faklieru, P.O.K. 8383 Tel-Aviv-Jaffa, IL-61083. Laŭ brazila tarifo. Aere.

Italio: Carla de Lorenzi, Corso Cosenza 18/10, I-10134 Torino (konto 33868100). 7000; 6000; 5500. 5000 liroj.

Japanio: H.R. MacGill, 1563-2 Okuyama, Inasa-si, Sizuoka-ken, 431-23. 700; 650; 600; 550 enoj. Aere.

Jugoslavio: Terezija Kapista, Studentska 39/23, YU-11070 Novi Beograd. 12; 10, 8, 6 din.

Kanado: Merle Haltrecht-Matte, 7083 rue Notre Dame, Orléans, Ontario, K1C 1J1. \$K 6, 5, 4,50, 4. Aere.

Kubo: Kuba Esperanto-Asocio, apt. postal 2108, La Habana 2.

Norvegio: NEL, Olaf Schous vei 5, N-0562 Oslo; 35; 32; 28; 25 Nkr.

Pollando: Halina Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49, PL-92-547 Lodz; J. Parzyszek, ul. Piasta 52/21, PL-15-044 Bialystok; Kastora Klubo, ul. Pulawska 3-11, PL-02-515 Warszawa. 2000; 1800; 1600; 1400 zlotoj pormomente.

Rumanio: Vasile Albu, Str. Eroilor 9, R-2400 Sibiu. 25, 23, 21 kaj 20 leioj pormomente.

Sovet-Unio: Sojuzpeĉatj ne plu funkcias. Kontakto SEU aŭ via klubestro. Ni aktive serĉas movadajn perantojn kaj centre kaj respubliko; ni jam kontaktis Moskvon, Kiev, Rostov-Don, Erevan, Tallinn kaj Kaunas. Verŝajne 7, 6, 5 kaj 4 rubloj.

Svedio: Lisbet Andreasson, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby. 35, 32, 30 kaj 26 SKR. Pĝk. 147429-5.

Svislando: Esperanto-perantejo Bern. Tel.: 031-427156. La donita adreso ne funkcias, telefono ilin! 6; 5,50; 5; 4,50 SFR.

Usono: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, aŭ Bern Wheel Books, 834 Wenonah Ave, Oak Park, IL 60304. \$5,50; 5,00; 4,50; 4,00. Aere.

Venezuelo: J.E. Bachrich, Apdo 3833, Caracas 1010 A. Laŭ la brazila tarifo, petu la enlandan tarifon. Aere.

**Abonu nun:  
JAM UNIKA  
JUN-AMIKA**



Legu LA REVUON „JUNA AMIKO“!  
Vi tute ne enuos kaj  
bonege plispertiĝos!



### ABONANTOJ DE JUNA AMIKO

Lando	1987	1988	1989	1990
Sovet-Unio	1148	1468	1666	1432
Hungario	837	951	873	830
Jugoslavio	10	102	297	181
Bulgario	240	221	252	226
Germana DR	130	161	180	141
Kubo	5	8	8	100
Brazilo	17	31	41	86
Ĉeĥoslovakio	180	203	220	70
Francio	7	37	44	64
Svedio	5	43	32	52
Togolaĝo	0	0	0	51
Usono	7	28	36	50
Pollando	5	36	77	70
FR Germanio	30	47	32	49
Britio	18	57	51	49
Italio	14	18	32	40
Belgio	7	15	16	34
Israelo	?	?	1	34
Tanzanio	0	0	5	23
Hispanio	?	?	4	18
Benino	0	0	0	13
Ebura Bordo	0	0	0	11
Aŭstralio	5	9	8	11
Kanado	5	8	5	11
Zairio	0	0	0	8
Aŭstrio	?	?	9	8
Madagaskaro	0	0	0	8
Kamerunio	0	0	0	6
Norvegio	?	?	4	6
Nederlando	7	11	11	5
Ĉinio	0	0	0	5
Venezuelo	?	?	2	5
Argentino	0	0	0	4
Japanio	?	?	1	4
Koreio	?	?	4	4
Senegalio	0	0	0	4
Mongolio	?	?	?	3
Niĝerio	0	0	0	3
Ruando	0	0	0	3
Ugando	0	0	0	3
Svislando	0	0	1	3
Finnlando	6	7	10	2
Irano	5	5	3	2
Landoj sume	?	?	33	48
Okcidente	6	138	311	333
Tutmonde	2725	3561	4122	6380

**Jen kanto, kiun ni erare ellasis el la antaŭa numero, sed fakte ĝi plue taŭgas, eĉ pli. Intertempe la vintro iĝis pli kruela — ne nur meteologie — ankaŭ la ekonomia klimato krueliĝis! La ventoj de ŝanĝo portas eĉ glacimontojn!**

**Pensu pri tio, dum vi kantas...**

## VINTRO KRUELA

(Germana popolkanto)

Traduko kaj  
muzika aranĝo:  
Franz-Georg Rössler



1. Vin-tro kru- e-----la, aĥ, frostbar--bar'!  
Vi for-ŝir- an----to de l' fo-li---ar',



vi finis la flor-a-don de la floroj.

2. La buntaj floroj: jen nura pal',  
forflugis m<sup>u</sup>te la najtingal'.  
Mankos al ni la kantoj, la koloroj!

Akompanaĵo obstina  
(Piano aŭ gitaro)

(8)



sepoje

strofofino

## LA INK-BOTELO

Sándor Petőfi

Aktoro migra, fama — Meĝeri —  
Samkiel la kunuloj, en seri'  
Program-afiŝojn skribis kun rutin',  
Kaj lin  
Pro l'ag'  
Ĵus trafis kvin-forinta pag'.  
Ja diris mi, ke kvin-forinta pag'.  
Neniel manku ĝi ĉe sama task',  
Do inkon li aĉetis sen prokrast'.  
Kaj kian lokon trovis la botel'?  
Ĉiel'!  
Ĉi-pak'  
De li ŝovita al la jak'!  
Ja diras mi, al dorsa poŝ' de l'jak.  
Li vigle ĝojis pro la mon-akir',  
Kaj kapreolis dum la hejmen-ir'.  
Tut-vane sonis la kunul-predik':  
Amik'!  
Pro l'ĝoj'  
Facile sekvos tuj priplor'!  
Ja diras mi, ke sekvos tuj priplor'.  
La vorto vanis. Pro la vigla salt'  
La ink' elfluis, kaj la dorsa part'  
Makula iĝis. Sekvis tuj malĝoj',  
Oj,oj,  
Pro l'tag'  
Fatala por la sola jak'.  
Ja diras mi, por lia sola jak'.  
Kaj pro la ĝuste flava jak-kolor'  
Imagu la efikon de l'dekor'!  
— Forĵeti ĉu? — Sed unusolas ĝi —  
— Jen li —  
Kaj ĝin  
Li portis ĝis ĉifona fin'.  
Ja diris mi, ke ĝis ĉifona fin'.



*Elhungarigis: Miklós Fehér, Miskolc*

Meĝeri: hungare Megyeri  
forinto: la hungara mon-unuo



# Junna amiko

## lerneja revuo

# La insulo de la sorto

Iam, en la pra-tempo, en iu ekzotika insulo ekzistis tri viroj. La unua estis dika kaj sincera. La dua estis mezdika kaj naiva. La tria estis ruza viro kaj tute maldika. Ili ĉiuj serĉadis energie rimedon transiri la maron. Sed vane. Finfine ili senesperigis kaj ne plu klopodis. De tiam sidante sub la sola arbego de la insulo ili fikse rigardadis la marondojn. Iun tagon, subite el la arbego ekaŭdigis jenaj vortoj: "Miaj filoj, kial vi ne plu penadas? Ĉu vi ne scias, ke en la norda angulo de la insulo kuŝas remboato?"



Ankoraŭ la arbo estis parolanta, kiam la tri viroj ekkuris al la boato, sed la forta voĉo de la arbego haltigis ilin: "Mi ankoraŭ havas parolon, miaj filoj! Tiu boato, kvankam estas malgranda kaj sufiĉas por nur unu viro, sed vi povos saĝe, sincere kaj fratece solvi la problemon, por ke vi ĉiuj estu savitaj!"

Miaj karaj amikoj, kion vi opinias? Ĉu ili pripensos kaj solvos la problemon? Jen, mi daŭrigas la rakonton...

La unua viro diris: "Unu el ni forveturu per ĝi kaj revenu kun alia boatego aŭ velŝipo."

La dua estis naiva kaj diris: "Estas bone."

La tria, la ruza viro, diris: "Jes, sed kiu el ni?"

La unua replikis: "Mi kredas, ke tiu, kiu remos dum longa tempo sola, devas esti forta, kaj tial mi proponas min mem..."

La naivulo: "Estas bone."

La tria: "Mi havas pli bonan ideon, kaj morgaŭ frumatene mi diros ĝin!"

Sed noktomeze, la ruzulo murmuradis kun la naivulo: "Mia amiko, la dikulo volas trompi nin. Li ne helpos nin. Li ne revenos. Pripensu, kvankam mi kaj vi estas du uloj, tamen pli malpeza ol tiu unu dikulo. Do, ni ambaŭ povas forveturi per la remboato, se li ne venus kun ni."

"Kion ni devas fari, do?"

"Ni... ni mortigos tiun dikulon kaj poste ni estos savitaj!"

La dua viro naive elbuŝigis: "Estas bone."

Poste ili ekprenis ŝtonegojn kaj iris ĉe la dormanta dikulo. La dua viro eklevis la ŝtonegon kaj celis la kapon de la dikulo. Ankaŭ la tria viro samtempe faris same. Sed li ne batis la kapon de la dikulo, sed la kapon de la dua viro! Jes, la dua viro mortigis la unuan kaj la tria senvivigis la duan.





Tiam la tria viro laŭte ridegis: "Ha,ha,ho,ha! Nun restas nur mi, kaj mi povas forveturi ... ha,ha,ha!"

Li kuris kaj kuris ĝis li atingis la remboaton. Sed, ho, ve, kion li vidis? En la boateto kuŝis grandega peza ŝtono, kvazaŭ la du mortigaj ŝtonegoj unuiĝis kaj sidas nun en la boato. La viro tre malĝojis kaj klopodis elboatigi la ŝtonegon, sed ju pli li klopodis, des pli li senesperigis. Li eĉ ne povis moveti la ŝtonon. Nur la forta dikulo estus povinta movi ĝin – sed li jam kuŝas morta.

Do, la tria viro laŭtvoĉe ploris, ploraĉis. Li ekkuris laŭ la insulo kaj kiel frenezulo kriaĉis. Ankoraŭ nun en tiu insulo estas aŭdebla lia kriego, kvazaŭ li diras: "La sorto malhelpas al tiu, kiu malhelpas al aliaj homoj."

*Miaj junaj amikoj, ĉu ne estas tiel? Kiu estas via opinio pri la supra rakonto? Skribu al mi vian opinion sur almenaŭ dek linioj; eble vi povos plibeligi la ideon per via propra sperto aŭ rakonto. Ĉiuj skribantoj ricevos bonan memoraĵon kaj al bonaj respondintoj mi donacos premion!*

*Via amiko, M. Mirhaghian,  
P.O. Box 37185/3331 Qom, Irano.*

### Trovu la sinonimojn

(vortojn kun sama aŭ simila signifo)

mortigis	fi-lerta
klopodis	maniero
ŝtonego	destino
ruza	deprimiĝis
naiva	malkutima
pensadis	grumbloĝemis
sorto	tristiĝis
sperto	respondis
rimedo	trompebla
ekzotika	okazaĵo
senesperigis	penis
replikis	meditis
murmuris	senvivigis
malĝojiĝis	roko

### Trovu anagramojn

(vortojn kun la samaj literoj, sed miksitaj)

laguno	sonlui
aŭlet	motive
furelzone	polviŝe
tombareo	prisilke
sidregi	vualino
manodor	ĉetrafe
damlaki	alĉirpos
fetoviru	bolpremo
netrafume	mempesta
mezalpa	kometzone

# LA MORTO DE KIKOS

Armena fabelo  
de H. Tumanjan

Estis iuj malriĉaj geedzoj. Ili havis tri filinojn. Iun tagon la patro estis okupita pri laboro, soifis kaj sendis sian plej maljunan filinon por la akvo. La knabino prenis la kruĉon kaj iris al la fonto. Ĉe la fonto estis iu alta arbo. Vidante la arbon ŝi ekpensis:

”Se mi edziniĝos kaj naskos filon, mi nomos lin Kikos — Kikos venu, surgrimpu ĉi tiun arbon kaj falu malsupren, sur tiun ŝtonon kaj mortu... Ho, ve! Kara Kikos! Ho, ve!” Ne perdante tempon ŝi sidiĝis sub la arbon kaj komencis priploran kanton:

Mi edziniĝis, filo naskiĝis  
kun ĉapo kokos kaj nomo Kikos!  
Grimpis li arbon, falis sur ŝtonon...  
Ve! Kikos kara! Ve! Filo nura...!

La patrino atendis la filinon, atendis, vidis, ke ŝi ne revenis kaj sendis la pli junan filinon, dirante: ”Iru, rigardu, kial malfruigiĝis via fratino?”

La plej maljuna filino ekiris, kaj vidante sian fratinton de fore, plilaŭtigis sian plorvoĉon: ”Venu, venu malfeliĉa onklino, vidu, kio okazis kun via Kikos.”

”Kiu Kikos?”



”Se vi scius...?”

Mi edziniĝis, filo naskiĝis  
kun ĉapo kokos kaj nomo Kikos!  
Grimpis li arbon, falis sur ŝtonon...  
Ve! Kikos kara! Ve! Filo nura...!

”Ve! Kara Kikos! Ve!” ekkriis la pli juna fratino, kaj ŝi sidiĝis apud la plej juna fratino kaj komencis plorĝemi kune kun ŝi.

La patrino atendis, vidis, ke ili ne revenis, kaj sendis la plej junan filinon dirante: ”Filino, iru kaj rigardu, kio okazis al viaj fratinoj? Ili iris kaj ne revenis.”

Do, la plej juna filino ekiris. Ŝi iris, kaj vidis, ke la du fratinoj ploradis, sidante ĉe la fonto: ”Hej! Kial vi ploras?” ŝi demandis.

La plej maljuna fratino respondis: ”Ĉu vi ne scias?...”

Mi edziniĝis, filo naskiĝis  
kun ĉapo kokos kaj nomo Kikos!  
Grimpis li arbon, falis sur ŝtonon...  
Ve! Kikos kara! Ve! Filo nura...!

”Ho, ve al via onklino! Kara Kikos! Ho, ve!”

Ankaŭ tiu ĉi fratino batis sin sur la kapon kaj sidante apud la aliaj aligis sian voĉon. La patrino atendis, atendis, vidis, ke la filinoj ne revenis, kaj do mem ekiris. Vidante sian patrinon de malproksime, la tri filinoj kune alvokis ŝin:

”Venu, venu, malfeliĉa avino. Vidu, kio trafis la kapon de via nepo!”

”Kiu nepo? Kia nepo, filinoj? Kio okazis?” La granda filino respondis:

Mi edziniĝis, filo naskiĝis  
kun ĉapo kokos kaj nomo Kikos!  
Grimpis li arbon, falis sur ŝtonon...  
Ve! Kikos kara! Ve! Filo nura...!

”Ho, ve! Blindiĝu la okuloj de via avino, kara Kikos!”

Frapas al si la genuojn ankaŭ la patrino, sidiĝas apud la filinoj kaj komencas priplori la perdon kune kun ili. La edzo vidas, ke ankaŭ la edzino postsekvis la filinojn kaj ne revenis. Li diris al si mem: ”Do, mi iru kaj rigardu, kio okazis — kial ili unu post la alia foriris, kaj restis ĉe la fonto. Li ekstaris kaj iris. Vidante ties kapon de malproksime, la edzino kaj filinoj tuj alvokis lin:

”Venu, malfeliĉa avo, rigardu, kio okazis kun via Kikos ... Ve, al via Kikos!”

”Kiu Kikos? Kion vi diras?” miras la edzo.

La plej maljuna filino diris: ”Se vi scius, kara paĉjo...?”

Mi edziniĝis, filo naskiĝis  
kun ĉapo kokos kaj nomo Kikos!  
Grimpis li arbon, falis sur ŝtonon...  
Ve! Kikos kara! Ve! Filo nura...!

”Ve, Kikos, kara!” batadis al si la genuojn kaj plorĝemis la patrino kaj filinoj. La plej saĝa inter ili estas patro. Li diras: ”Kial vi, malsaĝulinoj, sidas ĉi tie kaj ploras? Kiom ajn vi ploregos, kiom ajn vi lamentos, Kikos ne reviviĝos plu. Ekstaru ni, iru hejmen, alvoku homojn, faru liturgian servon, disdonu la

postmortan panon. Per plorado ni nenion atingos. Tio estas la leĝo de la mondo. Kiel io venis, tiel ĝi foriros.

Do, vi imagu, ke ilia tuta kvarpieda havaĵo estis bovo kaj la nura grenajaĵo estis potego da faruno. Ili forbuĉis la bovon, el la faruno ili bakis panon, alvokis homojn kaj manĝigis ilin per la tiu postmorta manĝaĵo honore al Kikos kaj nur tiam retranskiviligis.

Tradukis: A. Horsepjan

Redaktis: K. Azakeljan (kaj nia redakcio)

Ilustris: K.H. Kabaskaljan.

## Okuloj

Tiuj okuloj,  
tiel klaraj, tiel brilantaj,  
belaj kiel juneco,  
bluaj kiel sonĝo,  
subtilaj kiel la unua kiso.

Tiuj okuloj,  
tiel ĉarmaj, tiel gajaj,  
viglaj kiel turbo,  
grandpecaj kiel lagoj,  
helaj kiel idealo.

Tiuj okuloj,  
tiel penetremaj, tiel sinceraj,  
rapidaj kiel uragano,  
klaraj kiel lumo,  
kvietaj kiel trankvileco.

Tiuj okuloj,  
puraj kiel amo,  
varmaj kiel patrina mano,  
tiuj okuloj estas kulpaj ke mi estas  
maĝoĵa,  
tiuj okuloj estas kulpaj ke mi amas.

Veljkovic Dragana, 15-jara  
Leskovac, Jugoslavio.

## Interŝanĝo de lernantoj

Cent jugoslaviaj kaj hungaraj gelernantoj reciproke interŝanĝis vizitojn dum majo kaj junio 1990. Organizite de Internacia Kultura Servo, aŭtobuso kun 50 gelernantoj de zagrebaj elementaj lernejoj 'Gustav Krklec', 'Mladost', 'Miroslav Mrška', 'Josip Kraš' kaj 'Veljko Vlahoviĉ' el Velika Gorica kun gvidantoj Ankica Benĉek, Marija Jerkoviĉ, Zdenka Svetličić kaj kelkaj studentinoj lernantaj Esperanton ĉe SEK, vizitis Hungarion kaj Aŭstrion. Dum la 12a ĝis la 14a de majo ili gastis ĉe la elementa lernejo 'Nagy László' en la hungara urbo-to Pápa. La zagrebaj lernantoj tie prezentis kulfuran programeton, kune kun siaj gastigantoj.

Reciproka vizito de la hungaraj gastoj la 9an kaj 10an de junio prezentis la okazon viziti zagrebajn hejmojn. Bedaŭrinde, la gastoj restis en Zagrebo dum nur unu tago. S-ro Velimir Lukez helpis al ili konatiĝi kun la urbo. La gvidanto de la hungara grupo estis Jozefo Néméth. Kun la grupo alvojaĝis ankaŭ la direktorino de la lernejo en Pápa; tre favora por novaj Esperanto-kursoj en la sekvonta lernoĵaro en Pápa.

Spomenka Štimec.

## FAMILIOJ KUNE DENOVE

La Renkontiĝoj de Esperantistaj Familioj (REF) okazis plejparte en Hungario ĉar ili estis fonditaj de la familio Csiszar el Hungario: REF fariĝis renkontiĝoj por familioj en kiuj la infanoj parolas Esperanton denaske. Komence ĉeestis 4-5 familioj kaj poste ĉiam pli. Intertempe kelkaj infanoj elkreskis kaj ne plu ĉeestas REF-ojn. Tamen kutime ĉiujare renkontiĝas novaj kaj malnovaj geamikoj por amuziĝi, lerni, interŝanĝi interesarojn pri fremdaj landoj. Ĉiam unu al la aliaj instruas novajn ludojn dum plenkreskuloj paroladas aŭ kunsidas. La ĉi-jaran REF organizis du ĉefaj familioj en Tatroj, en Ĉeĥoslovakio, en la loko proksima de Spiska Nova Ves, Ni kunrestadis tie de la 26-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto, Mi vojaĝis tien kun mia tuta familio – gepatroj Ruza kaj Pajo, fratino Danka kaj kunvojaĝadis miaj geonkloj kun ilia filineto Tina.

Mi estas plej feliĉa ĉe REF-oj kiam mi povas kunestadi kun mia malnova hungara amikino Nora. La ĉefa ero de nia programo estis ekskursoj. Tio estis bona por ni, grandaj infanoj, sed ne ĉiuj pensis tiel. Tute malgrandaj infanoj ne povis ekskursi kaj ili havis nenian programon.

Nora kaj mi havis la okazon multe paroli sed ni ankoraŭ ne satparolis, eĉ se ni parolis dum tri noktoj, dum ĉiuj ekskursoj kaj tagmanĝoj. Tamen tio ne sufiĉis por rakonti ĉion kion ni volis pri la monatoj, kiujn ni ne pasigis kune.

Plejparte ni ekskursis perpiede al la montaro en ĉirkaŭaĵo ĉar ankaŭ la kabanjoj en kiuj ni loĝis kaj la tuta vilaĝeto estis en la montaro. La ekskursoj estis la plej interesaj kaj la plej malfacilaj, ĉar sur la lokoj, kie rokoj estis tro altaj estis altaj vertikalaj ŝtupetaroj, unuloke eĉ 90 metroj altaj.

*Maja Tiŝljar Jugoslavio*

## NI NOTAS

Ni dankas Tekla Szilassy, el fervojista fakgrupo en Szombathely, pro traduko de la kantoj el la muzikalo **La muro** de la muzikgrupo Pink Floyd. Ni ne povos aperigi la tuton, sed almenaŭ parton iam.

Kuraĝigon ni donas al s-ro Thomas Woodall en Kingsbridge, Devon, Britio, pro projekto de perkarta unu-lingva instrusistemo, ni esperas, ke vi trovos artiston kaj povos realigi la ideon.

S-ro Vlada Hasala el Straznice, Ĉeĥoslovakio informas pri afrank-stampilo memore al la centjara datreveno de la unua Esperanta-ĉeĥa lernolibro, kiun verkis F.V. Lorenz.

Dankon al Kati, komencinto de la korespondanta kurso de Eduko, pro la laŭdo al **Juna amiko**.

Sylvia Hämäläinen el Tampere, Finnlando, skribis al s-ro Renato Corsetti el Romo, Italio kun peto pri infan-rimaĵoj uzeblaj por decidi, kiu komencu ludon. Foje ni jam aperigis tiujn, ni invitas legantojn ensendi pliajn. Renato respondis al Sylvia per jena rimaĵo:  
unu-du, mia ŝu',  
tri-kvar-kvin, serĉu min,  
ses-sep-ok, granda kok',  
naŭ-dek, kapro diras mek-mek-mek.

.Al Didi Weidmann ni dankas pro informoj pri naŭtaga internacia junulara tendaro okazigota en Zuriko, Svislando tuj post la 47a IJK en Karlskoga, Svedio. Esperantistoj aktivas inter la organizantoj. Ni aperigos detalojn en JA 91/1.

Ni dankas al Kornelia Nagy el Rumanio pro la informoj pri ilia tendaro kaj sport-ludoj.

## Deziras korespondi

### Bulgario

Doris Nikolava, ul. V. Iŝchiev 34, et. 5, app. 15, Plovdiv. 17-jara, dez. kor. tutm. Interesiĝas pri muziko, gitaro, sporto, politiko kaj vojaĝado.

### Ĉinio

Wang Huai Yu, 9-hao, 17-li, 2-duan, Guilin-jie, Heping, 110002 Shenyang. Fraŭlo, delegito de multaj kompanioj, kiu volas fondi ĉinan restoracion aŭ kuracejon de ĉina medicino en fremdaj landoj — sendos kuiristojn aŭ kuracistoj el Ĉinio. Aĝo ne donita.

### Eburbordo

60 lernantoj, ĉefe el la 5a kaj 6a klasoj, deziras korespondi kaj starigi ĝemeligajn aranĝojn. Ili jam produktis lernejan gazeton en Esperanto, foto de kelkaj el ili aperis en nia lasta numero. S-ro Gilles Wallez, B.P. 1471 Abidjan 09.

### Japanio

Maiko Tamamizu, Fukutomi-nisi 1-tyome-15-12, Okayama-si, 702. 16-jara komencanto en lerneja klubo dez. kor. tutmonde.

### Norvegio

Grupo de 12–13-jaraj geknaboj dez. kor. tutm. Eklernis en okt. 1990: Ingebjorg Rambjør, Flaktveitvn. 734, N-5091 Flakveit.

### Sovet-Unio

Kolja Bogdanov, pf. 916/2, SU-252049 Kiev. 15-jara, pri ĉ.t. Interesiĝas pri libroj, biologio, filatelio kaj radio.

Klaso de 14 ĝis 18-jaruloj dez. kor. tutm. pri muziko, astronomio, historio kaj ĉ.t. Nikolajucenko Irene, 8-14-15 u. Krasnoperekosk, SU-334900 Krimeo.

Nataŝa kaj Marina Vdoviĉenko, str. 11 Prodolnaja 1-4-1, SU-327034 Nikolajev, Ukrainio. 14- kaj 7-jara komencantinoj dez. kor. pri ĉ.t. Ŝatas florojn, bestojn, ili kuracas kaj nutras senhejmajn katidojn.

**Jen demandoj pri la ok telefonoj sur la kovriloj. Laboru en paroj. Unu rigardu la bildojn, la alia starigu la demandojn kaj kontrolu la respondojn!**

## OK BELSONAJ TELEFONOJ

**Telefono 1:** Kiu staras apud ĝi? Kiel ĝi aspektas? Kiun sonon ĝi faras?

**Telefono 2:** Kiel ĝi aspektas? Kiun sonon ĝi faras? Kiu staras apud ĝi? Kiel li aspektas? Kial?

**Telefono 3:** Kie ĝi troviĝas? Kiuforma estas la aŭskultilo? Kiu alvenas? Kiel? Kian sonon faras la telefono?

**Telefono 4:** Kiu pasas la telefonon? Kion li portas? Kion li estis faranta? Kaj kion li antaŭ sekundo portis? Kial li faligas ĝin? Kio okazis al lia ĉapelo? Kiun sonon faras la telefono?

**Telefono 5:** Kiu staras apud ĝi? Kiel li aspektas? Kiujn vestaĵojn li portas? Kia estas lia hararo? Kiun sonon faras la telefono?

**Telefono 6:** Kiuj troviĝas apud la telefono? Kian sonon faras ĝi? Kial?

**Telefono 7:** Kia estas la viro apud la telefono? Kion li faras? Kiu estas lia nacienco? Kiuforma estas la aŭdilo de la telefono? Kiun sonon ĝi faras? Kie oni kutime aŭdas tiun sonon?

**Telefono 8:** Kion faras la persono apud la telefono? Kiel li aspektas? Divenu, kiu li estas. Kiun sonon faras la telefono?